



# Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago № 6 Junio, 2013

*Kara Leganto, la plej ĉefa anonco de ĉi numero estas pri la tradicia E-pikniko-2013.*

*En la junia n-ro vi ankaŭ legos respondon de nia prez. d-ro L. Kordylewski al frazo, kiun li trovs en dume ne aperigita artikolo; novaĵoj de tutmonda E-movado, daŭrigon de "W. Guthrie en E-o" (4) de K. Friese.*

*Agrablan legadon!*

—La Redakcio

## Tradicia Esperanta Pikniko

Tradicia Esperanta pikniko okazos, kiel kutime, dimanĉe, la 16an de Junio, inter tagmezo kaj 4 ptm en Schiller Park arbora rezervejo (stratkrucio de Cumberland-okcidenta kaj Irving Park-norda flankoj). Ne-aŭtuloj povas atingi ĝin per bus-itinero n-ro 80 (Irving Park), irante al la plej lasta haltejo "Cumberland", eĉ pli bone – iru al la bus-ripozejo sur la okcidenta flanko de Cumberland-strato. Bosko (budo) n-ro 13, vidu la verdan standardon. Prenu viajn neE-amikojn! Prenu viajn ŝatatajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn por vi kaj via amiko. Rostigilo funkcios.



## Ĉu Esperanto Bezonas Reformon?

Mi ne konsentas kun la tezo (el dume ne aperigita artikolo), ke **Esperanto bezonas reformon** por pli bone servi la neeŭropajn partojn de la mondo. Tiu aserto estas certe danĝera por Esperanto. Por Esperanto, kiel ĝi estis dum jardekoj. Tiu aserto malfortigas iun ajn argumenton por la ideo de Esperanto, kaj ankaŭ por la neŭtrala Internacia Lingvo ĝenerale.

Krome, iu ajn reformita Esperanto, malsama al la nuna, aŭtomate kaj absurde malebligis percepton de ĉio kio en la tradicia ĝisnuna Esperanto estis dirita kaj kreita. Analogie, mi kun peno lernis la hodiaŭan anglan, sed kiam mi iras al usona preĝejo, mi ne kapablas kopreni la antikvan lingvaĵon, kiun oni uzas tie...

Mi parolis kun multaj neeŭropanoj, kiujn tute ne ĝenas "eŭropeco" de Esperanto. Kontraŭe, la "eŭropa karaktero" de Esperanto estas iel eĉ forta "allogaĵo", same kiel aliaj eŭropaĵoj, ekzemple vestoj, manĝoj, muziko, arto, kaj aliaj kulturaj aferoj. Ni ne devas malaprezi la fakton ke Eŭropo havis (kaj daŭre havas) fortan influon sur la mondan civilizacion. Eĉ Usonon "konstruis" Eŭropanoj, laŭ la eŭropa stilo. Tial mi opinias danĝera, ke laste en Usono oni egaligas la tradiciajn eŭropajn/kristanajn trajtojn kun la aliaj influoj, fremdaj al la okcidenta tradicio. Tio konsekvence rezultas en la eventoj kiel lasta Bostona tragedio, aŭ 9/11.

Same pri la lingvoj. Mi kun granda timo observas

kreskon de la uzo de naciaj lingvoj kaj nelatinaj alfabetoj en Ĉikago. Ĉu vi scias, ke en Ilinojso oni jam povas oficiale voĉdoni en la ĉina? Kaj multaj ŝtataj eldonaĵoj aperas en pluraj lingvoj, kiel ekzemple la araba, nelegeblaj por ĝenerala publiko. Kiu kontrolas la enhavon?? Tio poste rezultos en tragedioj kiel en Bostono. La ŝoforo, forkaptita de la bombintoj, ne komprenis ilian interparolon en ties lingvo. Se la angla estus uzata – pli da valoraj detaloj estus akireblaj. Eĉ plu, ĉiun fojon, kiam la ŝtataj instancoj uzas oficiale alian lingvon ol la angla, ili evidente diskriminacias kontraŭ pluaraj aliaj ekzistantaj lingvoj, inkluzive de mia nacia – pola. Mi ja devis lerni la fremdan por mi anglan por esti sukcesa profesiulo en Usono, dum multaj aliaj ne bezonas fari tion por same perlabori Usonan "Ssecurity" en ilia nacia lingvo??? Ĉu tio estas prave kaj juste?

Same kiel por Esperanto – unu komuna lingvo por la mondo, mi krias por unu komuna lingvo por Usono!!!

**La neeŭropaj esperantistoj, kun kiuj mi parolis, ĉiam ankaŭ emfazadis, ke, kvankam fremda, Esperanto estas LA PLEJ FACILA el ĉiuj fremdaj lingvoj, eĉ aliaj neeŭropaj lingvoj.**

Do mi kredas, ke Esperanto NE bezonas reformon. Unu nacia lingvo (la usonec-angla) por unu lando (Usono), unu internacia lingvo (Esperanto) por la tuta mondo. Simple.

—Les Kordylewski

## Panoramio

La **Panoramio** estas foto-interŝanĝa retejo kiu akireblas pere de **Google Earth** kaj **Google Maps**. Fotoj aperas en la punktoj sur la terĝlobo, kiuj montras lokojn interesajn de la historia, kultura, arkitektura or natura vidpunkto. Ĉiu uzanto povas iam ajn aldoni



**Panoramio**

siajn fotojn en la lokoj kie ilin fotis. La loko estas detale markita per precizaj geografiaj koordinatoj en Google Earth. Aliaj uzantoj povas rigardi tiujn fotojn. Panoramio aplikas multajn lingvojn, kun ebleco de la komputila traduko.



En Panoramio ekzistas Esperanto-tema grupo, nomita “**ESPERANTO**”, kiu indikas lokojn ligitajn al Esperanto kaj Zamenhof tutmonde. Jam kelkaj personoj aldonis fotojn de la monumentoj de Zamenhof, Zamenhof-stratoj, pasintaj Kongresejoj, ktp. La Esperanto-Grupo estas relative modesta en have, kompare kun la milionoj de la alitemaj fotoj en Panoramio. Nepre indas ke esperantistoj aperigu pli da Esperanto-fotoj por la aliaj tutmondaj uzantoj de Google Earth.

Bonvolu konatiĝi kun Panoramio kaj publikigu tie viajn Esperanto-rilatajn fotojn. Uzo de Panoramio estas facila kaj plezurdonata. – *Inf. Les Kordylewski*



### Adreso:

Esperanto Societo de Ŝikago  
p/a Viktoro Pajuk  
8228 O'Connor Dr., # 2F  
River Grove, IL 60171  
(773) 344-2276  
www.esperanto-chicago.org

### Estraro:

Prezidanto – D-ro Les Kordylewski  
Vicprezidanto – Anonimulo  
Eksprezidanto – Viktoro Pajuk  
Sekretario – *Vaka*  
Kasisto – Karlo Gunn

## Woody Guthrie en Esperanto (4)

Ja, ja, la virinoj! Se viro ofte vagadas tra la lando ne estas facile resti en bona kontakto kun amata virino. Kaj vi certe komprenas ke en situacio kiam la rilatoj rompiĝis baldaŭ evoluas nova feliĉo. Sed atentu: Tiu penso kompreneble ankaŭ validas por virinoj! – *Tradukis Klaus Friese, Germanio*

### Pli Ol Un' Belulin'

*M: More Pretty Girls Than One (Woody Guthrie)*

Estas pli ol un' belulin'  
Estas pli ol un' belulin'  
Multajn urbojn konas mi  
Estas pli ol un' belulin'

Belaspektas la mar'  
Tien kaj reen  
Ondoj portas amon for  
Restas nur la sopir'

Rigardu la fervojon  
Trajno rulas jen  
Kun virin', mia amatin'  
Sed kuraĝon perdis mi

Estas pli ol un' belulin'  
Estas pli ol un' belulin'  
Multajn urbojn konas mi  
Estas pli ol un' belulin'

Estas pli ol un' belulin'  
Estas pli ol un' belulin'  
Multajn urbojn konas mi  
Estas pli ol un' belulin'

Estas pli ol un' belulin'  
Estas pli ol un' belulin'  
Multajn urbojn konas mi  
Estas pli ol un' belulin'

## Movadaj Novaĵoj

– Laŭ la lasta informo de UEA, al la UK en Rejkjaviko jam aliĝis 996 (preskaŭ milo) personoj el 54 landoj, la plej grandaj delegacioj venos el ne angle-parolantaj landoj, kiel Japanio (97), Francio (88), Germanio (83). El Usono dume aliĝis nur 37 gesamideanoj. Nur unu E-isto venos el Argentino por transpreni pezan E-flagon kaj kunporti ĝin al la sekvonta ĉef-urbo de Esperantio (2014) – Bonaero.

– Malpli optimismaj novaĵoj venis el Israelo, kie al la IJK aliĝis malpli ol ducent personoj.

– Esperanto-monumentoj diverslande aperas en nova anglalingva bitlibro. Mi rekomendas mendi la bitlibron (ankaŭ havebla en pdf sed precipe interesa kiel bitlibro): “Language Lover’s Guide to Europe” de <http://languagewriter.com/guide/>

– *Inf. Herman Deceuninck*

### MEMBROKOTIZOJ

Membro-subtenanto: \$40 jare;  
Familia membro: \$30,  
Regula: \$20  
Studento aŭ pensiulo: \$10.

Gifts are welcome also.  
Dues are needed for the routine expenses of the Society and reported on our website.

Check should be payable to the Esperanto Society of Chicago, and mailed to our Treasurer,  
Charles Gunn  
828 S. Ada St,  
Chicago IL 60607-4105

### KUNSIDOJ

Okazas kutime la kvaran mardon de ĉiu monato en:

**Sulzer Regional Public Library**  
**4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL**  
**Kunvenoj komenciĝas je 7 p.t. en la Suda**  
**Konferenca Salono, unua etaĝo.**

### SEKVANTAJ KUNSIDOJ

16an de Junio – Tradicia Ŝikaga E-pikniko

23an de Julio – Kunsido omaĝe al Gertrude Novak (Funebra Soleno: 27an de Julio, 11 a.t., Our Lady of Mt. Carmel Church, 708 W. Belmont Av.)

27an de Aŭgusto – UKdEo en Rejkjaviko